


Feliĉajn somerferojn 2003!



ENHAVO

Julio - 2003 - N-ro 30-a
ASTURIO


- 2... Nia Regiono
- 3... Balanciĝoj de L' Vivado
- 4... La Formulo de la Familio
- 5... La Ĵusveninto (4)
- 6... Mozaiko
- 7... Letero
- 8... Alia Mondo Estas Ebla
- 9... Mesaĝoj
- 10-11 Ĉuĉulina kaj Papilioj
- 12.. La Ventoflagoj
- 13.. Feliĉan Printempon
- 14... Emblemoj, Insignoj
- 15.. Amuzajoj
- 16.. Barcelona E - Centro



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**

NIA REGIONO

VALO PAYARES



Santa Cristina de Lena

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: **Nicolás Muñiz**

Prezidanto: **Cezaro García**

Sekretariino: **M^a Luísa Menéndez**

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**

Kasisto: **Luis González**

Bibliotekistino: **M^a Isabel Murillo**

Gekomitatanoj:

M^a José Álvarez Faedo

Valentín Pérez

Eva González

Gene Álvarez

Lisa Ejarque

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILÉS Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Depósito legal:

Nº AS 1398 (9)

N.I.F. 33677378

Subvenciita de la Registaro

de la Avilesa Municipio

La valo Payares estas la konfluejo de du el la ĉefaj riveroj de la municipo de Lena: la Güerna kaj la Payares. La plej alta punkto de la zono estas la interkrutejo Payares, je 1.379, kiu iĝas limo al la provinco de Leono. Ĉi tiu valo estas do la ĉefa komunikvojo kun la resto de la Hispana ŝtato. La vilaĝo Campumanes estis tre grava por la vojo de Sankta Jakobo; el tie la pilgrimantoj povis iri rekte al Kompostelo en Galicio aŭ viziti la katedralon San Salvador de Oviedo. Kvankam la aŭtovojo kiu alportas al la kastilia meseto iras laŭ la centro de la regiono, la flankaj pejzaĝoj estas verdegaj kaj belegaj. Estas mirindaj vilaĝetoj kiel Fierros, kie delonge oni ekstraktis feron, kaj Yanos de Somerón, famaj pro blua klaso da pizoj. Fama preĝejo de la “preromanika” arto en Santa Cristina. Tre proksime estas la monto Penubiña (kies nomo eble venas de kelta vorto signifanta ‘blanka’), de kie la vidaĵo estas vere surprizanta. La lingvaĵo de Lena apartenas al la centra astura, sed kun elstaraj trajtoj de la okcidenta dialekto, ekzemple la sono l.l, pli malpli miksaĵo da t kaj ĉ (L.lena estas la astura nomo de la regiono).

La Redakcio

BALANCIĜOJ DE L' VIVADO

En la doloro de la vivado
mi plu nenion esperas, mi plu neniun atendas
Ĉion mi havis, ĉio al mi foriris,
sed mi estas kontenta ĉar vi estas kun mi,
kaj la iluzioj de ni du sentitaj
kun tiom da kormolo, kun tiom da plezuro,
ankoraŭ postrestas en mia idealismo
kaj tie sekuras pro mia fidelec'

Kun sekura paŝo mi iras laŭ la vojo
apoge sur manoj de bonaj amikoj
kiuj glosas vian nomon kun tiom da emocio
ke de ili leĝeriĝas mia amara amdolor'.
Ekde la altejoj vi konservas mian ritmon,
Ekde la altejoj vi konservas mian fidon,
kaj mi cin konservas ene de mia animo
kaj mi cin konservas ene de mia esteco.
Sur la tero mi daŭriĝas sube de cia rigardo
nur ĝis kiam la vivado, en sekvo de sia kurso,
min portos ĉe via flanko, per alia balanciĝo

Verkis kaj esperantigis

M^a Luisa Menéndez



LA FORMULO DE LA FAMILIO



La duko Ding demandis al Konfuceo:

–Ĉu ekzistas iu formulo kiu garantias la prosperon de familio?

–Ne ekzistas kompleta formulo –diris Konfuceo–, sed ekzistas sentenco: “Estas malfacila esti registo kaj

ne estas facila esti regita”. Se la estroj de la familio kaj siaj gefiloj konsideras ke ambaŭ partoj bezonas cedi tiam la prospero alvenas.

La duko daŭrigis:

–Kaj ĉu ekzistas iu formulo kapabla detrui la kernon de familio?

–Ne ekzistas kompleta formulo –diris Konfuceo–. Sed ekzistas sentenco: “La plej granda plezuro de reĝo estas havi neniam iun malpermesante al li agi. Se oni ne malpermesas al ni fari la bonon ĉi tio estas bona. Tamen, en familio kie la patrino ne kuraĝas respondi al la filo la rilatoj iĝas fragilaj kaj finas detruitaj.

Ludoviko

LA ĴUSVENINTO

Estis multe da bruo sur la stratoj. Kaj ne estis vere mia plej bona tago por ĝin elteni. La pasintan tagon mi estis estinta en la trinkejo de mia amiko kaj li min ne lasis pagi eĉ glason. Sed tamen la suno brilis sufiĉe kaj finfine mi kuraĝiĝis suriri la straton kaj daŭre transserĉi la homaren. Mi tuj vidis viron kun megafono kriante lautvoĉe meze de la urbodoma placo. Li promesadis plibonigi la urban aspekton kaj atingi la plenan laboron por la tuta loĝantaro. Sed pleje el ĉio li atakis siajn politikan malamikojn, tiujn regante nuntempe la urbon kaj kiuj, laŭ li, kulpis pri la malbona situacio. Tuj mi rememoris ke la kampanjo por la venonta balotado estis ĵus komencinta. Jam nokte mi estis vidinta ularojn disdonante propagandon al la noktamantoj. Kaj tuj mi ankaŭ rememoris kial mia pantalono havis tiun malaspektan makulon: unu el tiuj fervoraj militantoj ŝmiris mian vestaĵon per gluo.

Subite aperis du knaboj sur la placo kiuj ekis disdoni paperojn al la piedirantoj. Iuj el ili kaptis la oferaĵon kun afabla rideto kaj dankis. El tiuj la duono ĵetis la broŝurojn je dek paŝoj poste, kaj el ĉi tiuj la duono ne uzis la paperujon, sed rekte la grundon. Nu, la alia unua duono grumbĵlis, kaj eĉ iuj el ili revenis al la disdonantaj knaboj:


“Nu, ĉu vi vere estas dononta laborposton al mia filino? Tion saman promesis la nuntempuloj. Vi estas ĉiuj la samaĵo!”

Subite, meze de la placo –kiun la ĵusantaŭaj registoj estis iganta porpiediranta, tre trafe, laŭ mia estimo– aperis granda kamiono kun brilaj koloroj. Softa muziko sonoris, kun iama voĉo invitante ĉiujn voĉdoni por la partio kiu nomis samkiel la kamiono, se konsideri la grandan roŭlon metita sur flanko de la alloga veturilo. Sed tuj la muziko iĝis freneza, malmilda rokmuziko, kaj iuj maljunulinoj kiu ŝajnis pretaj preni informadon pri la tie reprezentata partio ekkuris kvazaŭ la diablo.

Ne temas pri malŝato mia de tiu muzikstilo, tute kontraŭe, sed en mia farto, mi ankaŭ preferis forlasi tiun bataalkampon.

Mi do survojiĝis al la parko Ferrera, soifante je paco kaj trankvileco. Mi, naive, esperis trovi paradizeton sur la promenejo Esperanto, ĉirkaŭata de komprenemaj arboj kaj floroj. Senrezulte. La Esperantista Partio, svingante grandegan verdan flagon, estis tie disdonante siajn informilojn.

DOKJORO AJENDANJO



MOZAIKO

La pli altirpova. La potenco de magneto elfarita en la nacia laboratorio Lawrence de Berkeley estas 250.000 fojoj pli granda ol tiu de la tera magneta kampo.


Por eklipsiĝi : Dum unu jaro povas efektiviĝi maksimumo da sep eklipsoj kaj minimumo da du eklipsoj, laŭ astronomoj diras.

Per manumo da nitoj: En la turo Eiffel estas 2.500.000 nitoj.

La ĉiutaga haltigilo. La diglagoj konstruitaj en la varmetaj zonoj de la globuso moderigas la rapidecon de rotacio de la tero. Tio ĉi reduktas la daŭron de la tago po 0,2 miliononoj de sekundo, laŭ la geofizikisto Benjamin Fong Chao, de NASA.

Universala fokuso: Pistol Star estas la plej luma stelo el la kosmo. Situantita en la centro de la Lakta Vojo tiu ĉi blua giganto produktas brilon dekmilionfoje pli potenca ol la brilo de la suno.



Daise Murillo



LETERO



Plu ne estas pretekstoj. Kun tiom da informado kiu havigas al ni Interreto malmultekoste ekde tiom da elsendejoj en iu ajn urbo, kun tiom da facileco kiun la normala civitano havas por atingi nuntempe universitatan diplomo, kun centoj da programoj kiujn la radio kaj televido elsendas ĉiutage kaj tiel granda kvanto da eldonataj libroj ni devus esti iom pli konsciaj pri la iro de la eventoj. Sed kiam la ttt-paĝoj pri priinfana pornografio rangas la plej vizitataj, kiam gestudentoj forgesas sian alvokiĝon por ekhavi pli prestiĝitan titolon, kiam la radio adiaŭas kulturajn kaj denuncajn programojn serve al la kaŝita cenzuro kaj la plej ofte vendita libro estas romaneto kun ne engaĝita argumento kaj certa felicia fino, nenio mirigas. Dume, ĉi tie ni daŭras, ludante je blinludo kiel geinfanoj sur minsemita kampo sen mediti pri nia bonŝanco ne aparteni ankoraŭ al tiu kreskanta nombro da homoj kaj bestoj kiuj plu ne havas lokon en ĉi tiu globala, inerta kaj konsumema mondo. Kie la nura aĵo kiu ŝajne maldormigas nian junularon estas certiĝi daŭrigi vivnivelon (vojaĝoj, vestaĵoj, aŭtomobilo), dum la resto de la planedo ekde sia ĝangalo, sia aŭ sia kvartalo iras priserĉi en la granda favelo de utilaĵaro kaj malutilaĵaro (io el tio rubejo meznova) kiu agas kvazaŭ muro por la regno de Alice, kreske pli malgranda kaj elektema.




P S: en niaj urboj plu ne estas loko por kolomboj.

Verkis: Teresa Gutiérrez

ALIA MONDO ESTAS EBLA

Denove, la brazila Prezidanto, Luis Ignacio 'Lula' da Silva, luktis dum la Pintokunveno de la G8 (la grupo de la plej riĉaj landoj) en Evian (Francio), por unu el la plej bazaj homaj rajtoj, tio estas, la rajto de nutrado por ĉiuj.

Kaj denove, la riĉaj landoj rigardis aliflanken, kaj diskutis pri aliaj pli interesaj temoj... (surtute, pri la ĉiama temo: kiel ili povus esti, ankoraŭ, pli riĉaj...)



'La malsato estas netolerinda realeco', rimarkis Lula.

Lia propono estas simpla, praktika kaj facile realigebla:

Akiri monon per imposti armilan komercon aŭ per la investado en malriĉaj landoj de procento el la ekstera ŝuldo.

Sed la fina deklaro de Evian inoris lian proponon... kvankam ĝi konfesis ke milionoj da homoj povas tial morti.

En Brazilo, ekde la komenco de lia prezidanteco, en la pasinta unua de januaro, la elradikigado de la malsato estis lia ĉefa prioritato. Kun lia programo 'malsato nul', li uzis 1,5 milionoj da dolaroj el la Ĝeneralaj Buĝetoj, el privataj fontoj kaj el la Monda Banko, por alporti bazajn nutraĵojn al plej malriĉa loĝantaro, kaj li laboras por atingi ekonomian disvolvon kiu permesu pli justan disdonon da riĉeco.

Ni bezonas multe da homoj kiuj ankoraŭ kredas tion:
Ke alia mondo eblas...

Sukceson, Lula.!

Valentín Pérez García – Hispanio
cavayoloco@hotmail.com

MESAĜOJ

Nuntempe ŝajnas ke Interreto sukcesas en ĉiuj partoj de la mondo. La lernado de Esperanto per elektroniko furoras. Sciencoj ja progresas!

En nia urbo, ĉijare, nia asocio Antaŭen oferis E-kurson en municipan programon por la junularo nomita "Malfermita ĝis mateniĝo". La klasoj okazis nokte, kaj ili estis bona maniero formeti la geknabojn el trouzo da drogoj malgaje rilata al la nokta libertempo. Esperinde el ĉi tiuj novaj gelernantoj aperos fieraj militantoj por nia movado!

Bonas ke E-o havu fruktodonan prezenton en Interreto, sed ni ne forgesu la homan varmon ke la lokaj grupoj, pere de parolo, atingas. Ni strebu por ilin efektivigi!

Ni ĉiuj multe ĝojiĝis kiam ni legis en la bulteno "Esperanto Pyrenées" la enhavon de nia poemo "Venu" kaj la spritaĵon "Pri nasko". Dānkon, multajn dankojn!

Nekrologo:

Nin ĉiujn multe doloras la forpaso de la patrino de nia korespondantino Danuta, kiun iuj el ni ekkonis, persone, dum la pasinta U. K. okazinta en Polonio.

Ŝi ripozu pace!

Rememoru ke vi povas kontakti nin retpoŝtante ĉi tien:

esperanto@asturies.org

INTERRETO 



ĈUĈULINA KAJ PAPILIOJ



Iam, en stacidomo loĝis tute nigre vestita Ĉuĉulina. Tiel, Petro, la fervojisto, kutimis nomi sian karan amikinson, tio estas, la lokomotivo kiu ĉiutage akompanis lin sur reloj.

Jes, ĝi aspektis tre malpura, ĝia fumtubo ŝpruciĝis tiom da fumo ke malgraŭ du purigadoj ĉiutage, oni ne povis forigi la nigrajn makulojn. Cetere, ofte Ĉuĉulina, tre malgaja aŭdis kritikojn. Ekzemple: “Ĉu

estas ebla esti tiel malbela? Atentu, ne tuŝu la lokomotivon, se ne, vi similos al kamenskrapisto!”

Tamen, aliflanke ĝi fieris pri siaj kupraĵoj brilaj kiel oro aŭ pri la kupliloj kiuj funkcias sen knarado! Ĝi posedas fortegon nekredeblan, imagu ke ĝi povas facile tiri kvardek vagonojn.

Jes, ĝi tre bedaŭras ke oni misjuĝas ĝin dum ĝi estus pura sed ĝi bezonas karbon, ŝmirgrason ktp.

Feliĉe, tuj poste ĝi kuregas tra la kamparo, Ĉuĉulina forgesas sian-malgajon. Plezure ĝi trairas herbejojn, arbarojn, salutas survoje per gaja fajfilo la vilaĝajn dometojn kapvestitajn rozkoloro. Eĉ se ĝi konas la vojon parkere ĝi ĉiam atendas surprizon. Ĉu hodiaŭ ĝi renkontos Johanon la leporon, kiu per moviĝo de longaj oreloj salutos ĝin. Ĉiuj bestoj estas ĝiaj geamikoj, ankaŭ la arboj, la floroj. Poploj, kverkoj, pinarboj svingas pere de branĉoj kiam ĝi veturas. La lekantoj, la ranunkoloj, la papavetoj kreskas intence sur la taluso por agrabligi la veturadon.


Same, la bovinoj iras rande de la paŝtejo por amike rigardi ĝin. Fine, la vivo de Ĉuĉulina estas tre alloga. Bedaŭrinde ĝi maljuniĝas, sentas sin laca. Plie, novaj elektraĵoj lokomotivoj ekaperis, tute puraj.

Do, homoj decidis ke Ĉuĉulina ne plu iros sur reloj, ĝi restados en la stacidomo, oni purigos ĝin, farbos ĝin, poste oni elmontros ĝin al gelemantoj, kiuj tiel vidos en muzeo memoraĵojn de la pasinteco.

Dum sia lasta veturado, la lokomotivo sentas malesperon, ĝi senĉese fajfas. Adiaŭ la bovinoj, la kaprinoj, adiaŭ la hundino de la pastro, adiaŭ, kokinoj, anasoj, meleagroj...

Fine ĝi revenas, lastfoje, al la stacidomo. Tie oni skribas sur ĝia flanko, per orumitaj literoj ĝian nomon: ĈUĈULINA, oni ornamas ĝian fumtubon per trikolora rubando, kiu aspektas kiel skarpo. Ĉu oni timas ke ĝi malvarmumiĝu?

La urbestro, la urboj, konsilantoj, la muzikistoj estas tie por inaŭguri la muzeon. Ĉuĉulina dezirus plori, sed, ĉu lokomotivo rajtas plori? Ĝi sentas sin paralizita, preskaŭ senviva. Muziko, ridoj, parolado, ĉirkaŭ ĝi ne estas



kortuŝaj kiel la antaŭaj alvenoj en stacidomo. Tiam, ĉiuj estis ĝojaj kiam ĝi ekaperis, eta punkto ĉe la horizonto.

Meze de la floroj aranĝitaj de la organizantoj, neniu floreto kampara estas tie por plezurigi Ĉuĉulinan. Finite, ĝia vivo estas finita! Nun ĝi ne plu utilas, ĝi estas nur kuriozaĵo...

La urbestro pretas tuj tondi la trikoloran rubandon, la

klarionoj kaj tamburoj pretas tuj muziki kiam –ho miraklo!– la lokomotivo renaskiĝas.

Fumrubo ŝprucas el ĝia fumtubo sed ne temas pri ordinara fumo, tute ne. La fumo estas festa iriza kvazaŭ miloj da buntaj sapvezikoj suprenirus al la ĉielo.

Tamen ne temas pri sapvezikoj, ne, rigardu bone, temas pri miriadoj da papilioj kiuj, nokte, sinkaŝis en la ventro de Ĉuĉulina por fari el ĝi mirindan surprizon.

Neniam plu oni diros ke la lokomotivo estas malpura, neniam plu Ĉuĉulina estos malgaja ĉar la fumo de papilioj daŭre desegnos en blua ĉielo magian spiralon, bela kiel feina skarpo simila al tiu de IRIS, la Deino...

Hunlaborantino:

Fernande TERRAL

FRANCIO

LA VENTOFLAGOJ

En la soligita pejzaĝo,
Kie la ĝoja senhomigis koron de la poeton,
La ventoflagoj ne plu movebliĝas

Ho! Kiu malĝoja vidaĵo!
Kie la ĝojo senhomigis koron de la poeton,
la ventoflagoj ne plu movebliĝas!

Kie estas ĉi tiu loko?
Estus ie kaŝita fako
De mia disŝirita animo?!...

Nu, se estu tiel...
Se, efektive, procesu ĉi tiu konjekto
Je falsa valoro,


Necesigos petigi helpon:
Batalionoj! Potencaj milicioj!
Fortaj brakoj, bravaj, kuraĝegaj!

Fine, kiu estas ebla
Kaj povu efektivigi mirindaĵon de la
Sorto,
modifiĝante ĝin

Tamen, urĝu iun entreprenon,
Ĉar, nepre ke en la soligita pejzaĝo
la ventoflagoj movu sin!...

Kunlaborantino

El la libro 'floroj' de Micheline Ramos – 1997 - Brazilo



Feliĉan printempon



Iam blindulo sidis ĉe la vojo. Ĉe liaj piedoj kuŝis ĉapo kaj peco da ligno sur kiu legeblis jena frazo, mallerte skribita per kreto:

“Nome de Dio, helpu min. Mi estas blindulo”

Preterpasanta anoncisto, rimarkinte kiom malmulte da moneroj sidas en la ĉapo, haltis kaj, sen peti permeson, prenis la afiŝon, forviŝis ĝin kaj skribis per kreto alian anoncon.

Poste, remetinte la afiŝon, li foriris.

En la vespero de tiu sama tago, kiam la anoncisto denove pasis preter la blinda almozulo, li rimarkis ke la ĉapo plenas de moneroj kaj bankbiletoj.

Tiam, la blindulo, kiu rekonis lin pro la sono de liaj paŝoj, demandis al li, ĉu li estas la homo kiu reverkis la afiŝon kaj kion li skribis.

La anoncisto respondis:

—Neniam malveron! Mi diris la samon kiel vi sed per aliaj vortoj
—Kaj ridetante, li plu iris sian vojon.

La blindulo neniam konis la veran enhavon de la afiŝo, kiu fakte tekstis:

“Hodiau estas printempo kaj mi estas blinda”.

Fran (EA8EX) (Reverkis: Miĉjo Drakobona)

Emblemoj, insignoj

por Esperanto kaj Esperanto aranĝoj

Antaŭ kelkaj jaroj estis skribita en interreto kaj kelkaj gazetoj pri proponoj pri insigno por esperantoagado. Demando estis: ĉu malnova stelo aŭ nova 100 jara signo "rompita ovo", ankaŭ oni demandis kial Brustaj signoj estas malmulte uzataj. Interkomprenon eble oni ne atingis.

Laŭ mia opinio ĉiuj Esperanto-asocioj, -societoj, -kluboĵ aŭ -grupoj povas uzi kiun ajn insignon. Oni ne devas sekvi internacian centran organizon. Ĉiu povas plani insignon senlime, oni ne bezonas sekvi regulojn ekz. heraldikon kaj povas fari tian insignon, emblemon kiu plaĉas. Ni jam havas komunan insignon, nomon "Esperanto".

Anstataŭ tio grave estas ke insigno estus multe uzata. Esperanto-agado povas esti tiel neserioza, ke ĝi eblas uzi humorajn insignojn. Esperanto estas nia hobiaĵ kaj ni ne bezonas esti seriozaj, kvankam ni laboras por esperanto aktive.

Ekzistas kelkaj konataj kaj famaj emblemoj de grandaj internaciaj kompanioj, ekz. Shell, sed komparo kun ili ne sukcesas. UEA kaj landaj asocioj posedas nenian lokan societeton. Ekz. nia societo Antaŭen decidas mem, ĉu ni volas doni aŭ havi servojn de EAF aŭ UEA kaj aliĝi al ili. Tial oni ne bezonas komunan kaj similan insignon.

Kelkaj finnaj Esperanto-societoj havas insignon jam multajn jarojn, sed post personaraj ŝanĝoj ili ne daŭre uzas ilin kaj ne faris novajn.

Kie oni uzas la insignon? Leterpaperoj kaj kovertoj estas la plej oftaj kaj preskaŭ solaj. Alia estas glumarkoj kiujn eblas vendi. Ankaŭ unu objekto kiam eblas uzi insignojn estas diversaj okazoj, semajnoj kaj similaj, por reklami la aranĝon. Kelkfoje ekz. Vintraj- aŭ Aŭtunaj Tagoj havis insignon sed ne ofte. Eble la problemo estas nur en Finnlando ĉar eksterlande insignoj estas plej ofte uzataj, ekz. en Svedio esperantistoj havas propran insignon en ĉiu jarkunveno, jarkongreso.

Por seminarioj en Tampere, antaŭ nia UK 1995, ni havis neoficialajn insignojn. Tiu kvalita postulo ofte finas la tutan planon por


havi insignon, ĉar "artajn" opiniojn havas ĉiuj homoj, kaj tial oni ne vidas okazajn insignojn en Finnlando. Fakaj artistoj eble ne havas tempon fari tiel malgrandajn artaĵojn aŭ kostas tro multe se ili ne estas esperantistoj.

Fari kongresmarkon ne bezonas esti granda artisto. Se la organizo de la okazo jam havas insignon ankaŭ kongresa marko estas preskaŭ preta laŭ ĝi. Nuntempe multaj organizantoj havas komputilon kaj estas facile fari insignojn per komputilo aŭ kun helpo de komputilo, ĉiuj estas "artistoj".

Mia intereso por insignoj estas jam ek de mia 15a jaraĝo, kiam mi unuan fojon sekvis insigno-konkurson de konserno Huhtamäki-yhtymä en la gazeto Suomen Kuvalehti. Rezulto estis ege simpla kaj bona. Mi mem ne estas artisto sed kiel mi diras supre ĉiuj povas esti "artistoj". Mia hobiaĵ estas plani malgrandaj artaĵoj kiel ekslibrisoj por mi mem kaj por parencoj.

Sekve estas uzitaj markoj sen kritiko. Internaciaj okazoj, kongresoj, konferencoj havas preskaŭ ĉiam propran markon. Jen kelkaj insignoj, emblemoj en landaj kaj societaj aranĝoj.

Veli H



Emblemo de 100-jara jubileo de UEA, "rompita ovo", kun konturoj aŭ kolorigita.



En la jaro 1980 Antaŭen organizis insigno-konkurson kaj ricevis 17 proponojn kaj la estraro elektis apu dan proponon.

Plananto estis Sylva Hämäläinen



Amuĝaĵoj

CISIMO



Ŝi- Ĉu vi ne hontas veni hejmen je sia horo? Estas jam la tria matene.
Li- Sed, kara mia, se mi kuŝus en la lito, estus nun la tria tute same.

Patricia Harkin - AUSTRALIO -

EN GRANDA RESTORACIO

Pluraj amikoj instaligis por manĝi. Unu el ili flaras la teleron kaj diris al la estro.

- Ĉu tiu telero oni manĝis anasaĵon?

- Neeble - diras la estro - ni havas tre modernajn lavmaŝinojn.

Tio estas tre bone purigita.

- Mi ne dubas. Sed mi estas "nazulo" en fama parfumejo kaj tre bone konas la odorojn.

- Mi gratulas, efektive hieraŭ la menuo entenis anasaĵon. Do, vi ne pagos vian manĝon.

Tiel estis.

La morgaŭon, la samaj amikoj revenis, sed la restoraciestro ne volas denove donaci la manĝon.

Li iras en la kuirejon, prenas telerojn kaj diras al la servistino

- "Frotu ilin sur via postaĵo"

Kiam la telero estas sur la tablo de la "nazulo" li diras:

- "Ho! Mi ne sciis ke Ana laboras ĉe vi."

Edzo- La uloj ĉe la trinkejo diras ke la poŝtisto amoris kun ĉiuj virinoj en nia strato krom unu.
Edzino- Nu, mi vetas ke estas tiu aroganta sinjorino Adek.

PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por Publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON
c/ La Magdalena nº 26 - 1º D

